14-a JARO, N-o 459. MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. NOVEMBRO 1937.

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris-20

Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189. S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986. Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153. Wien n-o D-109 068. Zagreb n-o 41 448. Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».


La 18-a Kongreso de SAT en Bruselo

La Roterdama kongreso de SAT brile sukcesis. Okulfrape ĝi pruvis, ke nia kara tutmonda asocio venkis la krizajn jarojn k firm-paŝe ekiras la vojon al restarigo de siaj antaŭaj forto k aŭtoritato.

Sur la ŝultrojn de la Brusela SAT-anaro falis la peza k respondeca tasko prepari la venontan, la 18-an SAT-kongreson !

Verdire, oni sentas sin etuloj apud antaŭuloj kiaj montriĝis la organizintoj de nia 17-a. Tamen kun ilia helpo k konsiloj, kiujn ili tiom afable k senprokraste havigis al ni (pro kio ili estu varme dankataj), ni aferon k estas konvinkitaj, ke en Bruselo ankaŭ ili trovos la necesajn rimedojn, por ke la loĝeja demando solviĝu glate, por hotelloĝanto kiom por amasloĝeja vizitanto. Cetere por multaj kongresontoj la vivo en Belgio estas malkara, jam nur pro la monkurzo. Rilate la fervojon ni faros ĉiujn necesajn klopodojn por ricevi rabaton sur kiel eble plej da fervojoj.

Plie, la kongresontoj siaflanke ankaŭ iom klopodu. Memkompreneble ĉeesto en eksterlando ĉiam pli kostas ol kutima hejma vivo. Pro tio ni forte konsilas la



certe proksimiĝos nian gvidmoton : ĉiam pli bone !

Dekduo da fidelaj k fervoraj SAT-anoj konsistigas la O.K.K. Ili ŝparos nek tempon nek energion, por ke la entrepreno sukcesu k igu la kongrestagojn agrablaj por ĉiuj partoprenontoj. Pluraj komitatkunvenoj okazis k ni decidis pri la unuaj organiz-demandoj.

El pluraj flankoj ni aŭdis ke, aparte de la natura sopiro ĉeesti la kongreson, la belga ĉefurbo ankaŭ logas ; oni sin preparas al densa ĉeestado al la 18-a. Pro tio iuj K-doj antaŭtimas. Precipe la loĝado, laŭ kelkaj korespondaĵoj k laŭ la lastnumera « S-ulo », turmentas multajn kongresontojn. Ili estu kvietaj k fidu al ni. La tiuflankaj respondeculoj jam pricerbumis la porkongresan « ŝparkason ». Tiu ĉi povas esti individua aŭ grupa entrepreno. La lasta maniero havas pli grandan efikon ; ĝi pli facile arigas kelkajn partoprenontojn k igas la ŝparadon pli regula. Ĝi certe estas ebla en la sekcioj de la LEA-oj, kiuj rilatas kun SAT laŭ la Gotenburga Konvencio. En aliaj organizoj, la SAT-rondoj prenu la taskon sur sin. Tia iniciato plenumos servon ne nur utilan por nia 18-a, sed ankaŭ por la ŝparonto mem.

Estu ankaŭ dirite, sen fali en la ŝovinismon, k sen forgesi ke la ĉefa afero devas esti la kongreso, — ke la 18-a okazos en lando k en urbo vizitindaj je multaj vidpunktoj. Turista amatoro trovos, por satigi sian emon, famajn vidindaĵojn el antaŭaj jarcentoj, ĉefe mezepokaj. Riĉaj muzeoj pri belartoj, pri antikvaj tempoj, pri naturaj sciencoj estos viziteblaj.

En la laborista movado, ĉiu belga urbo povas atesti per signifa kooperativa aŭ sindikata konstruo pri la potenco k krekapablo de la organizita proleta klaso en Belgio. En Bruselo mem, plej moderna panbakejo, grandaj karbodeponejoj, okdek kvartalaj kooperativaj magazenoj, la « Okhora Domo » de la fervojlaboristoj, la sindikata kliniko k la fama brusela « Popoldomo » kies gravaj pligrandigoj estos verŝajne finkonstruataj kiam okazos la kongreso, ilustras la energian volon k la porpraktikan karakteron de la belgia proleta movado.

Kiu disponos pri pliaj tagoj, povos per du-trihora trajna veturo viziti Genton, Brugge, Antverpenon, Ostende k la marbordon, aŭ oriente sin direkti al Lieĝo k ĝui la pitoreskajn angulojn de monteta regiono (Ardenoj).

Do, kiel vi vidas, K-doj, riĉaj da instruo k da ĝuo estos la kongrestagoj. Vi do preparu vin por partopreni la 18-an ! Vi, kiu ne ankoraŭ konas nian organizon, venu kiel gasto k « per propraj okuloj » informiĝu ! Vi, kiu jam legadas « S-ulo »-n, sed ankoraŭ ne SAT-aniĝis, faru plian paŝon : aliĝu al SAT k ĉeestu la kongreson kiel plenrajta SAT-ano !

SAT-anoj el ĉiuj teranguloj, aliĝu la kongreson *multope* k *frue*, por ke ni povu prepari imponan manifestacion pri la forto de SAT k de la proleta esperanto-movado !

Jam nun ni salutas vin per elkora bonveno !

M. Van Aelst,
Prez. de la O. K. K.

Sennacieca Revuo

La 16-paĝa ilustrita monata revuo

El la enhavo de l'novembra kajero : Leteroj k raportoj el Japanio, Polio, Rumanio, Svisio, Kanadio, Hispanio ktp. — Diskutejo. — Literaturaĵoj, Kritiko. — Ĝardenkultura Terminaro, kc. *Prezo de l'kajero : 2.50 fr. fr. — SAT.*



Adreso de la O.K.K. :

Por Mono : K-do G. Basteels. 26, rue du Parnasse, Bruxelles-XL, Poŝta ĝirokonto : 332.15.

Por ĉio alia : K-do L. Strainchamps, 148, Av. du Roi, Bruxelles-Ft.

1-a KOMUNIKO

Kotizo : La kongreskotizo estas 40 belgaj frankoj. — Por frualiĝontoj (antaŭ 1. junio 38) : 30 belg. fk. Por senlaboruloj : 20 belg. fk. (frualiĝontaj senlaboruloj 15 bg. fk.).

Loĝado : Ni planas kiel eble plej zorge k kontentige plenumi ĉi tiun servon per hoteloj, privataj loĝejoj, tendejo, uzo de « Junulara Gastejo », k per organizo de amasloĝejo. Sed, por ke ĉio ĉi glate organiziĝu, nepraj kondiĉoj estas : *frua aliĝo* k *zorga plenigo de la aliĝiloj.*

Adresoj : Oni atentu la adresojn de la O.K.K. Monon oni sendu per poŝtmandato aŭ ĝiro, al la kasisto. Ankaŭ uzeblaj estas la poŝtĉek-kontoj de SAT en la diversaj landoj.

Vojaĝo. Ni klopodas akiri redukton ĉe la fervojoj (angla-belga-franca-nederlanda k aliaj, se necese). Ni vokas al la lokaj k landaj SAT-anoj, por ke ili iniciatu karavanojn (per fervojo aŭ biciklo) k « porkongresan ŝparkason ».

Glumarko. La O.K.K. presigis belan glumarkon (dukolora). Prezo : 5 bg. fk. por 100 ekzempleroj. Mendu ĉe la kasisto. Multe propagandu !

Por la O.K.K. : La sekretario.

UNUA LISTO DE ALIĜINTOJ

1. K-do A. M. Riswick, *Roterdamo ;* 2. G. Basteels ; 3. J. Coen ; 4. V. Collard; 5. K-ino S. Dubois; 6/7. Gek. J. Lebacq; 8. L. Strainchamps; 9/10 Gek. M. Van Aelst; 11. C. Van Oostveen, *ĉiuj en Bruselo.*

Ĉu vi scias, kio estas la socialista proletaro? Tio estas homamasoj, kiuj kolektive amas la pacon k abomenas la militon. La ŝovinistoj, la naciistoj estas homoj, kiuj kolektive amas la militon k la buĉadon. Johano Jores (Jaurès).

Bruselo, 29. julio 1914.

Ĉiu plenumu sian devon...

Nenio ŝajnas al mi pli ridinda ol pacistoj, kiuj sin ĝeme turnas al la tuta mondo, dirante : « Ne batalu !... Ne mortigu !... Vivu pace !... Estu fratoj !... » Tiuj pacistoj unue ne havas sufiĉe fortan voĉon por aŭdigi ĝin trans la landlimojn ; sed eĉ se ili havus, tio neniel signifus, ke la mondo aŭskultas, atentas, *komprenas...*

La bombastaj pornaciaj alvokoj ja estas ne nur ridindaj k senefikaj, sed eĉ maltrafaj. Kial paroli pri frateco al homoj, kiuj fakte ne estas, nek povas esti fratoj ? « Esti fratoj », tio signifas aparteni al la sama familio, havi saman patron — almenaŭ spiritan — saman moron, *saman lingvon.*

Ĉu tiel estas inter la homoj de malsamaj nacioj ? Certe ne ! Ne nur la nacianoj diversspecaj havas malsamajn morojn k kutimojn, sed ankaŭ malsamajn lingvojn ; ili do tute ne povas interkompreniĝi k sekve estas tre ridinde konsideri tiajn homojn kiel fratojn el sama familio.

Tian bedaŭrindan staton ni nun ne povas aliigi. Malgraŭ tio, ke esperanto ekzistas jam de 50 jaroj, tamen estas plorinda fakto, ke la esperant*ist*oj — mi ne diras la esperant*an*oj — estas ankoraŭ tre malmultenombraj. Kaj kiom da ili komprenas la profundan signifon de l'samlingveco, de tiu fakto, ke per uzado, aplikado de esperanto kun homoj el ĉiuj mondpartoj estas eble akiri menson de mondcivitano ? Kiom da ili penadis senigi sin je ĉia naciemo k tiel fariĝi taŭgaj por interfratiĝo malgraŭ ĉiuj landlimoj ? Jes ja, nur samlingvanoj povas eksenti k fine kompreni, *konscii,* ke ili konsistigas la embrion de la « granda rondo familia », pri kiu parolis Zamenhof.

Inter esperantistoj estas logike paroli pri tutmonda interfratiĝo, pri paco k amo. Sed maltrafe, ridindege estas prediki fratecon al homoj, kiuj efektive ne povas esti fratoj, ĉar ili devas stari mutaj unuj apud la aliaj, pro neeblo interkompreniĝi.

Konsekvence, al la nacianoj, kiuj povas esti fratoj nur inter difinitaj limoj, pli malpli longaj : al la homoj, kiuj volas konservi, defendi la naciecojn, ni ne rekomendu interfratiĝon, sed simple diru : « *Vi plenumu vian devon.* La sendependeco de via lando estas minacata k vi deziras, ke ĝi restu plene suverena ; nu, bone, vi devas ja esti preta por oferi vian vivon tiucele. Vi devas akcepti loĝi en kazerno, vivaĉi en tranĉeoj, obeadi blinde al iaj ajn ordonoj diktatorecaj de l'milita stabo ; vi devas unuvorte rezigni vian homecon por teni k konservi vian naciecon... »

Verdire, kiam naciistoj diversspecaj, diversnuancaj k diverslandaj buĉas unuj la aliajn por la gloro de sia respektiva patrio, tiam nia koro bedaŭras k kompatas, sed nia cerbo ne povas ne kompreni, ke tia buĉado estas tute normala... Mi eĉ konfesas, ke iafoje venis al mi la amara penso ke ju pli multe da patriotoj estas elmondigitaj per sia reciproka malsaĝo, des pli bone ! Ili plenumis sian devon. Kaj estas konstatebla fakto, ke naciistojn oni ne povas konvinki per raciaj argumentoj. Sekve...

Kio estas vere terura k priplorinda, tio estas, ke homoj, kiuj ellernis k praktikadis esperanton, kiuj penadis senigi sin je ĉia naciemo, t. e. la *sennaciiŝtoj*, tiuj riskas esti perforte eldevigataj partopreni patriotan buĉadon. Racipensante, oni nepre alvenas al la konkludo, ke nur tiaj homoj estas kompatindaj, tiaj ke dum milito ili ne plenumas sian devon, sed male agas kontraŭvole, k eĉ riproĉate de sia konscienco. La devo de sennaciisto estas tute mala je tiu de patrioto, de internaciisto, de ĉiu ajn, kiu predikas, ke la nacioj gardu sian sendependecon. Internaciisto *devas* buĉi aŭ esti buĉata ; sed sennaciisto *devas* nepre per ĉiuj fortoj penadi por eviti partoprenon en bataloj, kiuj por li estas tute sensencaj.

Kiam la Lenina k Uilsona (Wilson, prezidinto de Usono) principo pri sendependeco de l'nacioj estas ie ajn minacata, tiam ĉiu internaciisto devas volontuliĝi por defendi k savi la sanktan principon. Kaj male estas la devo de ĉiu homo, kiu akiris la firman konvinkon, ke tia principo estas esence reakcia, resti nepre ekster la internaciaj bataloj. Nur la klasbatalon partoprenu sennaciisto ; nur por defendi sian homecon li konsentu morti aŭ mortigi... Kaj tiurilate tre menciinda estas la fakto, ke homoj devis dum jarcentoj elbataladi la raiton ne aparteni al iu ajn eklezio. Similan batalon devos fari la sennaciistoj por akiri la raiton ne esti naciano. Ili devas organiziĝi tiucele k nenial imiti la internaciistojn, kies bonintenca agado estas tamen niaopinie *esence* reakcia...

Ĉiu ja plenumu sian devon k tion farante neniu rajtos riproĉi al la alia. Kiu kuraĝe agas laŭ sia konvinko k konscienco, tiu indas estimon.

Kaj aliparte SAT havas ankaŭ sian specialan devon : esti same akceptema al la tezo de l'sennaciistoj, kiel al tiu de la internaciistoj. Nia organizo estas laŭstatute ekstertendenca k sekve ne havas, nek povas racie havi partiecan programon. Ni ĉiuj plenumu nian devon...

E. L. ITANSA.

Por ŝtopi la Breĉon

60. LISTO

Loterio distr. kunveno FLE. en Arnhemo je 22. 8. 37	guld.	1,55
A. W. v. d. Starre, Roterdamo	»	0.70
14 335, Vieno	fr. fr.	52.63

Gek-doj ! Kiam vi rekotizas aŭ mendas librojn, ne forgesu la Breĉon !

Grupo da fabriklaboristoj deziras korespondi kun laboristoj ĉiulandaj pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. K-dino *G. Verweij-v. Wijk,* v. Ostadestr. 384, *Amsterdam-Zuid* (Nederlando).

Ni kreskas !

ESTAS tute certe : post serio da mallumaj jaroj de konfuzo k de dubo, SAT hodiaŭ havas solidan reputacion de laborista esperantista organizo unika en la mondo. La anaro ĝoje kolektiĝas en ĝi. Ni kreskas ! Ke ne temas pri nuraj vortoj, pri tio atestu nia decido realigata ekde ĉi tiu numero : publikigi de nun la oficialan organon de SAT, « Sennaciulo », regule kun *10 paĝoj* anstataŭ la ĝisnunaj 8 (« La Lernanto » konsistigos la 9-an k 10-an paĝon).

Time vi verŝajne ekdemandos : Ĉu oni postulos pli da abonmono pro tiu pligrandigo ? — Ni kontente respondas : Ne ! La tarifoj restos *neŝanĝitaj* tiom longe, kiom daŭros la nunaj kondiĉoj por presado k disvastigado ! (Se por kelkaj landoj la tarifo aperas iom modifita, tio okazis konsekvence de la ŝanĝitaj monkurzoj — la aĉetpovo de la franca franko ekz. grave malaltiĝis).

Per tiu ĉi decido nia ni montras nin optimistaj. Juna movado ne havas inklinon al nigraj pensoj. Sed nepra kondiĉo por vivdaŭro de la 10-paĝulo estas senĉesa varbado. Al vi, Gek-doj, ni direktas la insistan peton : Disvastigu la parolilon de SAT, disvastigadu SENNACIULO-n tra la tuta terglobo, penetrigu ĝin en ĉiujn partojn de la mondo, eĉ en la plej malkumajn angulojn, por ke ankaŭ tie ekbrilu la lumo de nia movado ! Paroloj forsonas, skribo restas. Zorgu, ke la presita vorto de l'SAT-anaro trafu kiel eble plej multajn, atingu ĉiujn, al kiuj la laborista esperantismo signifas celon, k eĉ tiujn — ŝanceliĝantajn — por kiuj firma voko devas esti instigilo al enviciĝo. Kun ĉies helpo antaŭen al pli granda eldonkvanto, al pli larĝa disvastigo, por ke « *S-ulo* », alternante en la monata aperosekvo kun sia pli granda fratino *SENNACIECA REVUO*, plenumu inde sian rolon de peresperanta idea ligilo ! Ni ne dubas, ke niaj aktivuloj penados...

La Plenum-Komitato de S.A.T.

El niaj Leteroj

... La neforgeseblaj tagoj en Roterdamo, en k ekster la SAT-kongreso, ne nur donis al mi ĝojon, sed ankaŭ riĉan materialon por pripenso. Ĉu ni vere estas SAT-anoj, estas la demando, kiu kiel rezulto de la pripensado ekstaris, aŭ pli ĝuste, restariĝis antaŭ mi. Restariĝis ! jes, ĉar la kongreso en R. firmigis miajn antaŭajn konvinkon k sperton, ke la statutaro de SAT ne multe efikis por forigi la tradiciemon, rutinemon k ambicion el la K-daro de SAT. La inerto montriĝas eĉ en niaj rondoj, ĝia potenco estas efektiva, ĝi malavare subvencias la miopon k nanecon : la bone preparitaj bataloj, kiujn sugestas la Statuto, restas senefektivigotaj pro nuraj baraktadoj. Ĉu do mi fariĝis pesimisto ? Feliĉe ne ! Malfacilaj tempoj kreis heroojn. Mi kredas je malavara klerigado de l'junularo k fidas ĝian efikon rilate juston k liberon en la *nepre novaj* socioj kreendaj... *(4226)*.

Ne nur per pano la homo vivas, sed ankoraŭ per tio, kio eliras el la buŝo de homoj inspiritaj. Kaj kiel pano estas por la stomako, tiel estas por la cerbo la enhavo de la SAT-organoj. Kaj, kiu nutras sian cerbon per tia legaĵo, tiu neniam pereos en dogmoj. Pensu libere k legu la SAT-organojn !

Klas Karlsson (20.059).

En la jaro 1919 mi por la lasta fojo rigardis piedpilkan konkurson. Kun granda entuziasmo mi aplaŭdis la ludistojn k inter ili ankaŭ la ludiston P., kiu miaopinie estis treege lerta. Sed, iom poste oni eksigis lin pro « mankanta lerto ». Mi bone memoras la naŭzan impreson, kiun faris sur min tiu novaĵo. Kaj de tiu momento mi perdis intereson por pilkludo, stafetkuro ktp., entute por sporto, kies rezultoj dependas de komunaj klopodoj.

Nur por la individua sporto mi havas admiron. Kiam homo kapablas salti pli alten ol aliaj, kuri pli rapide ol aliaj, tio estas frapa pruvo pri lia grandega korpa lerto. Kaj ĝuste pro tiu individua sistemo mi tiom multe ŝatas la mensajn klopodojn en *Sennaciulo*. Militema artikolo skribita de sincera K-do, povas esti bonega k aplaŭdinda, sed tamen ĝi verŝajne malsukcesas apud artikolo kiu klopodas pruvi, ke milito estas miljara, malsana tradicio.

Kaj per sia individua sistemo *Sennaciulo* eble fariĝos la sola gazeto en la mondo, tial ke homoj ne plu emas legi naciajn gazetojn. Benata estu la tago, kiam *Sennaciulo* kvazaŭ sana koro pumpos sian freŝan sangon en ĉiujn, eĉ la plej malproksimajn vejnojn.

Gaja knabo.

... Neniel mi emas riproĉi al vi pro publikigo de la patriota parolado de la ĉina eksministro Ĉen-mig-ĉu (n-o 54/55, « S. R. »). Tamen la legantoj ricevis per tio tro unuflankan bildon pri la situacio en Ĉinio. Tial mi kredas, ke estas utile konigi ankaŭ la vidpunkton de alia ĉina patrioto, nome Ĉi-Ksje-Juan, generalo k prezidanto de la asocio *Grand-Azia Societo*. Tiu eminentulo parolis per radio la 24-an de sept. 37 k la anglalingva ĉiutaga ĵurnalo « Te Manchuria Daily News » de l'1-a de okt. raportis pri tiu parolado. La temo estis : *Azio al la Azianoj* k la argumentado celis pruvi : 1) ke la Nankina registaro estas sub la influo de fremduloj, precipe de rusoj ; 2) ke ĝi estas plene respondeca pri la nuna milito ; 3) ke Japanio ne havas teritorian anekscelon k deziras nur pace k libere komercadi k rilati kun Ĉinio ; 4) ke Japanio k Ĉinio devas alianciĝi por fordetrui la influon de fremduloj el Azio k atingi, ke tiu kontinento estu plene libera k suverena.

Se iu dirus, ke tiu generalo estas subaĉetita de Tokio ; se aliu rebatus, ke Ĉang-kaj-ŝek estas subaĉetita de Londono k Moskvo, mi ne scius, kion respondi. Ne eblas kontroli tiajn verŝajnajn asertojn. Sed pri kio mi ne dubas, tio estas, ke la ĉinaj kulioj k kamparanoj havas absolute nenian intereson aliĝi al la vidpunkto de iu ajn el tiuj generaloj.

Mi legis raporton, laŭ kiuj la vivnivelo de la proletaro en Manĉukuo iom plialtiĝis, de kiam japanoj regas tie. Ne eblas nun al mi kontroli la fakton. Almenaŭ estas tute certe, ke sub la regado de la generaloj el Nankin k Kanton la sorto de l'ĉina popolo ne povas esti pli mizera. Pri tio atestas ĉina esp-isto mem, Cicio Mar, en sia antaŭ nelonge aperinta libro : « Forgesitaj homoj ». Kredeble tiu aŭtoro tamen estas naciisto k volas la sendependeçon de sia lando. Intelektuloj, ĉinaj studentoj k. s. kiuj konsistigas la regantan aŭ regeman klason en Ĉinio, kompreneble havas ian intereson al tio, ke ili mem regu k ekspluatu anstataŭ fremduloj, ĉu japanaj aŭ aliaj Sed tiu kategorio da homoj reprezentas tre malgrandan pocenton k mi pensas pri la tuta popolo, kiu en sia grandega plimulto ne havas atomon da intereso oferi sian vivon por la gloro k ambicio de iuj ajn regemuloj. (E. Itanŝa).

Al la konscienco de Japanio

S-ro Van HINTE, reprezentanto de nederlanda Hindio ĉe la Tut-Pacifika Paca Ekspozicio en Nagoja dum aprilo 1937, alvokis la konsciencon de Japanio tiele (laŭ Japana *Esperanto-Nippon*) :

« Dum 1300 jaroj vi kuraĝe prenadis el eksterlando kun bona sukceso budaismon, kristanismon, materian civilizon k spiritan kulturon. Kaj ili estas jam nun bone alproprigitaj al vi. Ni nederlandanoj tion admiras k estimas. Kaj nun oni denove komencis esplori grandan mision de Japanio. Kiel esperplena ĝi estas ankaŭ por nia speciala celo : MOND-PACO, JUĜADO k PERADO anstataŭ PERFORTADO k MILITO. En vi ni gratulas Japanion, en vi ni gratulas la mondon. Ni estas tre feliĉaj konigi al vi :

Japanio estas gvidanto en Oriento. Japanio estas konscienco de la mondo. Kaj vi estas la gvidanto k konscienco en Japanio.

Sinjoroj, samideanoj, kiuj sentas sin respondecaj pri la estonto de la mondo, manon en mano, ni laboru ! Mondo devas esti en harmonio. Ni sincere deziras ke Japanio estu en la fronto por paca laboro. Ni nederlandanoj, kiuj estas viaj amikoj dum 300 jaroj, sincere gratulas al vi japanoj ».

La respondon al tiu alvoko ni ĉiuj konas. Kiam lernos la pacistoj, ke al militistoj k aliaj ekspluatantoj oni povas alvoki ne per mildaj vortoj, sed per fera pugno, kiu estas la nura argumento, al kiu ili aŭskultas ? Dependi de la konscienco de tiaj homoj signifas liveri nin ligitaj en iliajn manojn k oferi niajn infanojn al la buĉistoj

A. M.

AL ĈI TIU N-o ESTAS ALDONITA LA NOVA SAT-KATALOGO KUN LA TARIFO POR 1938.

Impresetoj pri la Pariza Ekspozicio

Tre multnombraj ĉiulandanoj vizitis la Parizan internacian ekspozicion, ankaŭ multaj K-doj esp-istaj, kiel mi povis juĝi proprokule. Ĉio interesis la vizitanton, sed precipe lian atenton altiris la USSR-a pavilono, tiel laŭ la arta, kiel la teknika flanko.

Tamen, tiuokaze, la esperantisto facile k rapide rimarkis mankon. En la pavilono de l'soveta lando, porbatalanto de internaciismo, ekzistas neniu angulo por la internacia lingvo esperanto. Tio miaopinie estas grava forgeso.

Mi deziris, okaze de l'vizito, aĉeti libreton eldonitan plurlingve, sed ne esperante, kun titolo « Nova Konstitucio ». Ciuj franclingvaj broŝuroj disvendiĝis. Bedaŭrante tion, mi rimarkigis al la vendisto : Estus dezirinde, ke la eldonaĵoj aperu internacilingve. Li ridetis. Por konvinki la K-don pri la utilo de esp-o, mi certigis al li, ke ja la Biblio aperis en esperanta traduko.

La vendisto ne plu ridetis, sed nur rimarkigis afablatone : « Sinjoro, mi ne estas ĉi tie por diskutadi... » Mi komprenis. La argumento sukcesis... De nun li eble komprenas la gravon de nia movado. La « plagiatistoj » de l'biblio uzas la tutmondan lingvon kiel ilon por disvastigi religiajn doktrinojn. Ĉu esp-o ne povus ankaŭ utili la Internaciojn por alproksimigi homojn k popolojn? Ĉi tiun rimarkon mi enskribis sur la Libro de Impresoj, por eble esti utila al la estraro de la pavilono...

Mi instigas aliajn Gek-dojn, vizitontaj eble la Ekspozicion, ke ili en pavilonoj, kie estas Impreso-Libro, ne forgesu enskribi siajn opiniojn pri esp-o kun salutoj al la esp-istoj k laboristoj de l'koncernaj landoj. Tiel ni utile propagandos k venkos multan indiferenton. Mi estus kontenta ekkoni pere de « S-ulo » (aŭ leteroj) la opiniojn de ĉiulandaj K-doj pri la Pariza ekspozicio.

L. G. (20.074).

K-do ROFO sciigis nin persone, ke klopodante ŝanĝi hispanan 50-pesetan monbileton ĉe la Pariza Ekspozicio, en la posttagmezo de l'22-a de sept., li spertis rifuzon de la oficisto ĉe la monŝanĝejo, pretekste ke... la bileto ne surhavas la subskribon de... FRANKO ! Tiel okazinta en la paradejo de l'respublika k popolfronta Francio de la jaro 1937.

Pensoj pri Esperanto

Forpasis kongresoj de esperantistoj. SAT sukcese kongresis en Roterdamo, IPE fanfaronas pri sukceso en Parizo, la neŭtraluloj ankaŭ amase kuniĝis en Polio, kie ili penis akiri akordiĝon inter la du organizoj UEA k ĝia kontraŭulo IEL. La rezulto estos laŭŝajne du neŭtralaj kongresoj en 1938, unu de IEL en Londono k unu de UEA en Brno. Eĉ por ni SAT-anoj tiaj skismoj estas doloriga k signifas malbonon por nia celo.


Intertempe la adeptoj de « Baza angla » (*Basic English*) forte propagandas sian lingvon. Lastatempe la B.B.C. (Brita Disaŭdiga Korporacio) denove rifuzis disaŭdigi esperanton, ĝi eĉ ne permesas la uzon de la vorto « esperanto ». Ja okaze de la kimra ĉiujara muzikfesto, ĉe kiu estis konkurso por esperanta traktaĵo gajnita de estono, iu bone konata persono volis paroli radie pri tiu konkurso, sed la rifuzo estis definitiva.

La fama angla ĵurnalo « Novaĵa Kroniko » (*News Chronicle*) en tutpaĝa artikolo demandas : « Ĉu ĉiu lando baldaŭ anoncos *Angla parolata ĉi tie?* » La artikolo informas, ke en Hitlerio nuntempe la angla estas devige instruata en ĉiu lernejo, k kiel kompletigo la B.B.C. ĉesis instrui radie la francan k jam komencis instrui germanan lingvon. Laŭ la nomita ĵurnalo 220 milionoj da homoj jam parolas la anglan kiel sian patran lingvon k pliaj 20 milionoj uzas la lingvon kiel duan lingvon.

Estas fakto, ke en Britio mem estas parolataj pli ol dek dialektoj nomataj angla. Mi kiel irlandano parolas dialekton apenaŭ kompreneblan en kelkaj partoj de Britio. Ĉi-jare mi veturis tra Anglio k renkontis multajn personojn, kiujn mi tre malbone komprenis. Venis al Kimrio viro el norda Anglio por instrui ministojn, kiel funkciigi difinitan maŝinon. Ĉar li parolis dialekton k uzis malsamajn nomojn por maŝinpartoj, ni lin ne povis kompreni k li devis foriri ne farinte la instruon. Tamen la influo de la radio k lernejo iom samigas la prononcon k baldaŭ rezultigos forigon de dialektoj.

Ni esperantistoj esperas, ke la angla ne fariĝos mondlingvo, sed la nuna potenco de tiu lingvo, la vivigo de la fonto, ĉiam havos vivodaŭron. Entute ne estas miliono da esperantistoj en la tuta mondo, k en preskau ĉiu lando troviĝas pli da homoj, kiuj scipovas paroli angle ol esperante. Ĉu do ni rajtas post 50 jaroj fieri pri nia lingvo?

Th. Aldvorth (18876).



Tiu ĉi bildo montras la faman templon de Siamio en Bangkok. La originala foto estas sendita al lia korespondanto de unu el niaj siamaj partoprenantoj en SATKO.

Premio por frupagantoj!

La Administracio, kies laboro treege amasiĝas ĉe la jarkomenco, estas tre dankema al tiu kategorio de membroj, kiuj en frua dato pagas sian kotizon. Ĝi volas ankaŭ en tiu ĉi jaro per favora oferto montri sian dankemon al tiuj Gek-doj, kiuj estas plej akurataj. La K-doj (membroj aŭ abonantoj), kiuj pagis la tuton aŭ parton el sia kotizo por 1938 ĝis plej malfrue la 31. januaro, *rajtas aĉeti unu aŭ plurajn librojn de SAT, laŭ nia katalogo, je 2/3 prezo. Ekzemple, frupaganto povas akiri, samtempe pagante la mendon kun la kotizo, LA FERA KALKANUMO por* 10 fr. frankoj (afr.) *anstataŭ 15 (katal. prezo). Tiu ĉi oferto estas unufoja k validas nur ĝis la fiksita dato.*

Tra la Esperanta Gazetaro

Por korespond-libero!

En « La Semanto » (n. 39), bulteno eldonata de la svisaj lab. esperantistoj, ni trovas liniojn (de la redakcio), kiuj parolas per si mem k malnecesigas komentojn : « Bonvolu noti en memoron », diras la redaktoro, « ke sovetiaj K-doj sendis leterojn al eksterlandaj komunistoj, en kiuj ili priskribis tute objektive la teruran situacion en kiu ili vivas. Tiuj komunistoj, ne volante kredi tion, opiniis, ke iliaj korespondantoj estas « kontraŭrevoluciuloj »; ili do sendis tiujn leterojn al la C.K. de S.E.U. (t. e. Centra Komitato de Sovetrespublika Esp. Unio) k la kompatindaj sovetianoj estis malliberigataj. Do se la korespondanto apartenas al nova formiĝonta klaso, li kompreneble emas pentri al vi helan bildon. Ne forgesu, ke la P.E.K.-aparato estas kreita, por ke esp-o ne povu esti uzata por senpera, senkontrola interrilatado de sovetianoj kun alilandanoj. Kia ajn estu la respondo (se oni ricevas respondon) de iu korespondanto, ĝi ne povas havi la saman valoron kiel la atesto de persono, kiun oni konas intime k kiu restis en la koncerna lando, scipovante ankaŭ ties nacian lingvon. La restado devas esti kelkjara k la kontakto kun la kamparanoj k simplaj laboristoj devas esti intima por ricevi certan bildon pri la vivostato. Se ekz. la korespondanto skribus « La reĝimo en nia lando estas la plej abomeninda, kiun oni povas imagi »,... tiam la skribinto tuj estas kaptata pere de la G. P. U., Gestapo aŭ OVRA. El tio rezultas la ĉesigo de la interkorespondado en tiu momento, kiam oni demandas pri internaj aferoj... » La redaktoro konsekvence petas, ke oni pardonu al tiuj K-doj en diktatore regataj landoj, kiuj ĉesigas korespondadon ne volante riski sian kapon aŭ longdaŭran enkarcerigon.

La signifo de niaj Kongresoj

K-dino *Moore*, iom simile kiel K-do Veder ĉi-numere, subtenas la *politikajn* debatojn en la SAT-kongresoj (en « Kritika Observanto » n-o 4). Tamen ŝi rekonas k substrekas la pozitivajn flankojn de niaj kongresoj, vidante la nuran negativan en la « forkuro » antaŭ la konfliktokreaj tendenco-debatoj. La respondo, farita de la redaktoro ĉi-numere al K-do Veder, taŭgas ankaŭ al la linioj de K-dino Moore. Ni aldonu nur, ke niaj kongresoj ĉefe volas esti propagandaj manifestacioj, kiuj devas pruvi al la tutmonda proletaro, ke simplaj laboristoj el diversaj landoj povas en la praktiko jam nun facile k profite utiligi esp-on. Tiu propaganda impreso forviŝiĝus en atmosfero de malkonkordo k disputemo. La komparado de ideoj k tezoj ja povas okazi dum tuta jaro multe pli fruktodone en la gazetoj, ol estas eble okaze de nia mallongviva ĉiujara manifestacio, la SAT-kongreso.

Okcidentaĵoj en Orienta gazeto

En sia n-ro 34-a « Tempo » (Kioto) publikigas paroladon de B. Ŝo (Shaw) disaŭdigitan radie en Anglio al la britaj gejunuloj, kun konsiloj de la maljuna spertulo al la nespertintoj. Tia publikigo montras la progreseman k senantaŭjuĝan karakteron de tiu ĉi japana esp. gazeto (monate aperanta). En la n-oj 33-a k 34-a troviĝas i.a. longa letero de K-do Lanti, per kiu li eldiras sian opinion pri *Historia Materialismo* en la lumo de faktoj k precipe en rilato kun la Sovetia eksperimento. Ĉar multaj el niaj legantoj ankoraŭ kun troa pasieco rilatas al herezaj pensoj, ni ne kuraĝus publikigi tiaspecaĵon en la SAT-organoj. Kiuj ŝatus legi tiujn dirojn de Lanti, ili turnu sin mem al la gazeto « Tempo » (Teramati Ebisugaŭa, KIOTO, Japanio), mendante la du n-ojn. Bedaŭrinde ne ĉiuj artikoloj en « Tempo » estas verkitaj korekte k bonstile.

DISKUTEJO

For la Neŭtralismon!

Jen batalkrio eterne freŝa ! Novaj okazoj konfirmas ĝian ĝuston. « For la Neŭtralismon ! » estas dekomenca voko de SAT, sed estas dube, ĉu ĝi trovis plenan aplikon. Fakte, estas neniu dubo, ke tiu krio restas multe pli idealo ol atingitaĵo. Kelkaj difinitaj ekzemploj tion ilustras.

Dum la ĵus okazinta kongreso en Roterdamo la sugesto de brusela SAT-ano pri atribuo de la sufiĉe atentinda sumo kolektita por la hispanaj K-doj, al hospitalo kreita de l'Sindikatara Internacio, « estis sufiĉa », diras « S-ulo », n-o 456, « por estigi akratonan debaton, kiu taglume elmontris la profunde dormstate kuŝintan malharmonion regantan rilate la politikajn problemojn. » Kaj, daŭrigas la redaktoro de « S-ulo » : « Ĝi pruvis pli ol io alia la neceson evti en niaj kongresoj la politikan debaton k akcenti ĉiam k ĉie la kulturan k edukan flankon de nia asocio. » Se la redaktora opinio estas en plena akordo kun la dekomenca SAT-batalkrio, tiam aŭ mi aŭ li devas troviĝi inter la senalfabetuloj. Tion nek mi nek li konfirmos. Fakte lia opinio estas tipe k esence esprimo de neŭtralismo.

Ĵus la kongreso faris (1) tre salutindan ŝanĝeton en la unua paragrafo de l'Statuto. Ĝi deklaris, ke SAT ne estas PARTI-POLITIKA organizo, sed esence LABORISTKLASA. Per tio la kongresintoj forigis la enstatutan kontraŭdiron, ke, unuflanke, SAT deklaras... utiligi praktike... esp-on por la KLASAJ celoj de la Laboristaro tutmonda k, aliflanke, SAT statute malkonfirmis esti « Politika » organizo. Organizo, kiu faros ion ajn por progresigi la *klasajn* celojn de la laboristaro estas neeviteble *politika*.

Deklarinte, ke SAT estas ne PARTI-POLITIKA, sed KLASA organizo de l'esp-ista tutmonda laboristaro, la kongresintoj, klare aŭ malklare, sin turnis kontraŭ la sektemon, kiu inspiras la tielnomatajn labor. partiojn. Esence tia deklaro signifas rifuzon, malaprobon al politiko, kiu estas ĉio alia ol laboristklasa. Kial? ĈAR, *se* klara lab-klas-partia programo povus larĝe prezentiĝi, la inteligento de la lab. esp-istoj ne povus rifuzi aprobon, debatemon, akcepton. Finfine ja troviĝas du *partioj* en la tutmondo. Tiu de la laboristoj k tiu de la kapitalistoj. Ke ekzistas pli ol du partioj, tio nur indikas, ke la kapitalismo eluzas multajn rimedojn por sin savi. Tiu fakto plie indikas, ke la laboristoj devas diligente serĉi, « bone kompari, ĝuste kompreni k prijuĝi ideojn ». Sed, ĉu ili povas fari tion, se oni volas « eviti en niaj kongresoj la politikan debaton »? Neniam k neniel ! Tia ideo estas absurda k la absoluta neo de la celdeklaro de SAT.

Se SAT volas ludi gravan rolon, se ĝi volas pravigi sian ekziston en la historio de la homaro, ĝi devas trovi vojon, rimedojn por ebligi la plej larĝan debaton, malpermesante nur malveron k maldecon en la debato. Se tio ne efektiviĝos, la Historio konstatos iam en estonto, ke la laboristoj iam dande foruzis sian tempon per ludilo, kies nomo estis SAT. Ne multe pli malsevera estos la juĝo.

Ke ĉi tiuj konsideroj estas tre aktualaj k ne nur havas pasan intereson, ankaŭ ilustras alia ekzemplo trovebla en la sama n-o de « S-ulo » sub titolo « Esp-o k Popola Fronto ». Enkonduka noto informas, ke la artikolo estas rifuzita kiel « netaŭga » de la komitato de F. E. T. k sekve ne aperis en « Travailleur Espérantiste ». La artikolo de l'FET-grupo en Fabrègues konstatas tre elementajn verojn ; ĝi instruas lecionon kiun neniu esp-isto povas malatenti. Sed tamen ĝi trovis malfavoron ĉe la franca lab-espista organo k *favoron* ĉe SAT ! Oni devas aprobi la enpreson en la SAT-organo..., sed esence tiu ago nur prezentas politikan agon de la SAT-redaktoro. Mi aplaŭdas lin, sed la «neŭtralisma» spirito, kiu laŭŝajne regas en FET, mi estas certa, multe ekscitiĝos.

La ideo « ne partopreni en diskuto, disputo, batalo, milito », estas la plej absurda en la kapitalista socio. Ĝi signifas fari sian pacon kun la ekspluatantoj k TIES HELPANTOJ. Jes, regas batalo en la kapitalista socio k neniu sociano povas forkuri, eĉ se li aŭ ŝi volus, tiun batalon. Regas batalo ne subpremebla, la klasbatalo por transvivi. « Neniu lertlanga politikisto povas volbi trans ĝi, neniu kapitalista profesoro aŭ oficiala statistikulo povas ĝin forargumentadi ; neniu kapitalista predikisto povas ĝin vuali, neniu laborista misgvidisto disstare bridi ĝin ; neniu reform-arkitekto povas ĝin transporti... » k ni aldonu, neniu esp. redaktoro povas ĝin eviti... kiom ajn arde li petos. Li ja mem partoprenas en ĝi, ĉu li konfesas aŭ malkonfesas ĝin. Ju pli frue la SAT-anoj konsciiĝos pri la vero, ke neniu povas eviti la debaton pri politikaj problemoj, k ke, laŭ la vivo, neniu tion faras, eĉ ne la plej fanatikaj « neŭtraluloj », des pli frue ni suriros la vojon « plej rektan... k plej irebian » por ĉiu el niaj samklasanoj, la vojon, kiu forkondukos la homaron al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo k kulturo.

Tiu ĉi artikolo estus nekompleta, se ĝi preterirus la incidenton, kiun, laŭraporte, kreis la paroloj de la ĉefredaktanto de « Popola Fronto » el Valencio. Li « surpaŝis la MALPERMESITAN terenon de la mondpolitiko » k « la roterdamaj K-doj konfirmis, ke sendube K-do Hernandez delonge estus forpelita el Nederlando, se la registaro antaŭe scius pri la okazontaj diroj de la hispana K-do ». Alia, belega ekzemplo de la « neŭtralismo » reganta tiel en Nederlando, kiel en SAT. Dum mi skribas ĉi tion, mi ankoraŭ ne legis la dirojn de K-do Hernandez (1). Klasbatalano, eĉ ĉefredaktoro povas eldiri ankaŭ malsaĝaĵojn. Sed en demokratioj, laŭteorie, eĉ malsaĝajoj estas direblaj. Kaj de kiam SAT troviĝas sub la kontrolo de la nederl. registaro? Se ĝi limigas la liberon pri parolo, kial kongresi en tia « neŭtralisma » lando? Eĉ mil partoprenantoj ne kontraŭpezas la rajton pri libera parolo k esprimo. Mi ne volas sugesti ĉi tie, ke la riproĉita parolinto eldiris ion precipe revoluciecan,... eĉ la absolutan malon registaroj trovas oportuna persekuti..., sed certe ne estas forgesinde, ke ĉiu moderna registaro estas nenio alia ol la plenumorgano de l'kapitalista klaso. Kial ni do indigniĝu pro surpaŝo de la tereno de mondpolitiko? Fakte, ni ĝoju, ni aplaŭdadu... la aktivan forŝiriĝon de la ideo pri neŭtralismo. Ankoraŭfoje, por ĉiam, FOR LA NEUTRALISMON !

T. Veder (1307).

La redaktoro respondas : K-do Veder vidas neŭtralismon ĉie ! Tamen, SAT montras per sia tuta laboro, ke ĝi estas MALneŭtrala ĝisoste rilate la klasan problemon. Ĝia « neŭtralismo » koncernas nur la div. lab. tendencojn reprezentatajn en ĝia mezo. K-do Veder devus do kompreni, ke ni per la citita frazo nur celis averti : *Evitu enkonduki ĉe niaj kongresoj la disputpunktojn, kiuj disigas nuntempe la div. klasbatalajn organizojn* — malnovega principo de SAT ! Relegu ekz. la Kaselan gvidrezolucion ! (en « For la Neŭtralismon ! », pĝ. 28). Kaj unu el tiuj disputpunktoj estas ĝuste la hisp. milito. Pri ĉio alia, pri niaj propraj aferoj, pri nia movado, nia organizo, nia eduka laboro estis eble tute libere paroli ankaŭ en Nederlando. Sekve ni havis nenian motivon malakcepti la inviton de l'nederlandaj K-doj al Roterdamo (ili longe k pacience atendis sian vicon !). Estas ne tiom malfacile konformiĝi al la leĝoj de iu lando, kien oni venas kiel *gasto*, se temas nur pri tio eviti nepre disputigajn temojn. En tio ni observas ne la interesojn de la reakcia registaro, sed niajn proprajn !

(1) *Proponis*, ĉar Kongreso ne povas fari statutŝanĝojn. La proponon devos konfirmi baldaŭa *Referendumo*. — *Red.*

(1) K-do V. sendis la artikolon fine de aŭgusto. — *Red.*

Ĉu idismo?

Leginte la artikolon « For la Idismon ! » en n-ro 458, mi povas trankviligi s-ron E. L. Itanŝa : mi ne sentas min ofendita. Sed li estas malprava, nomante miajn vidpunktojn Idismo. Ili estas nur la rezulto de Esperanta Fundamentismo.

S-ro Itanŝa ripetas la malnovan aserton, ke « lingvo ne estas matematiko ». Tiu aksiomo estas ĝusta tute ĝenerale, sed mia opinio estas (kvankam mi ne estas matematikisto k eĉ ne havas specialan matematikajn inklinon k kapablon), ke en aglutina lingvo, kia estas esp-o, la vortfarado funkcias matematike, algebre.

Se la sola aŭ ĉefa gvidilo en esp-o estus la klareco, oni povus — ekzemple — uzi la akuzativon (kiu ja faras tiom da malfacilaĵó al la plimulto da esp-istoj !) nur en tiuj okazoj, en kiuj neklareco rezultus el ĝia neapliko. La konsekvenco estus lingvo plena je esceptoj. Kaj jen la ĉefa kialo de mia (laŭ kelkaj s-anoj troa) logikeco rilate la vortfaradon en esp-to : Mi volas defendi kiom eble plej longe k ĝis la maksimuma eblaĵo la senesceptecon de esp-o, kiu estas unu el niaj plej gravaj bataliloj. « Predikante » ĉiam k ĉie nepran (aŭ maksimuman) logikecon, mi tion tamen ne faras kredante, ke pleja logikeco k senescepteco povus iam esti atingita ĉe ĉiuj esp-istoj. Mia vera idearo estas la jena :

Preskaŭ ĉiuj esp-istoj neatentas unu el la ĉefaj diferencoj inter esp-o k ĉiuj « naciaj » lingvoj : En la « naciaj » lingvoj la parolata lingvaĵo estas tio unua, baza, primara, k la skribata (literatura) lingvaĵo estas tio konsekvenca, sekundara. La aŭtoroj skribas siajn «nacilingvajn» verkojn kvazaŭ sur la bazo de la parolata lingvaĵo, k la poetoj plibonigas k plibeligas la parolatan lingvaĵon en k per siaj verkoj. — En esp-o la skribita lingvaĵo estis (k estas) tio unua, baza, primara, k la esp-istoj, kiuj parolas nian lingvon, imitas kiom eble plej bone la skribitan literaturan lingvaĵon de Zamenhof k aliaj bonaj aŭtoroj. (Tial mi malaprobas la klopodojn de kelkaj el niaj literaturistoj, kiuj volas krei « literaturan esperanton », kredante, ke la afero estas sama en esp-o kiel en la « naciaj » lingvoj, k tute forgesante, ke — krom en kelkaj partoj de la Zamenhofa Proverbaro, la Gimnazio k La Revizoro — al esp-o preskaŭ tute mankas familiparola lingvaĵo.) La esp-istaro, imitante la lingvaĵon de niaj verkistoj, same facile (aŭ same malfacile) imitus la maksimume logikajn formojn, se la aŭtoroj klopodus (laŭ miaj k aliies rekomendoj) eviti la neologajn nelogikaĵojn, kiuj estas esceptoj en nia lingvo. Eĉ se ĉiuj aŭtoroj k bonaj oratoroj nur uzus tute logikajn, do tute fundamente regulajn, formojn, la komencantoj k mezspertaj parolantoj ne povus perfekte imiti tiun senesceptan, tute logikan esp-on ; ili sekvus la leĝon pri « minimuma peno » k uzus la nematematikan esp-on, kiun E. L. Itanŝa ŝajne aspiras. Mi ne diras, ke tio estas terura afero, ĉar iom post iom pli k pli multaj esceptoj eniĝos en nian lingvon, k neniu k nenio povas tion malhelpi. Sed ni povas fari ĉion eblan por konservi la maksimuman regulecon de esp-o kiom eble plej longtempe, ĉar unu el la plej efikaj varbiloj por esp-o estas, ke ni povas diri : « Esperanto ne havas esceptojn ! » Kaj tion ni ne povas diri, se ni aprobas la nelogikajn, neregulajn formojn; tion ni povas diri nur, se ni kontraŭbataladas ilin kiel malkorektaĵojn.

Charles Minor, L.K.

P. S. — Ĉar mi rekomendis, ke oni ne uzu adjektivon substantive, vi akre riproĉas min, indigne rifuĝante malantaŭ la dorson de Zamenhof. Tamen, en la sama artikolo vi senhezite parolas pri « la estonto de nia movado », kvankam Zamenhof klare diris (Lingva Resp. 46), ke « la vorto « estonto » povas signifi nur « estonta persono », sed ĝi ne povas signifi « estonta tempo » aŭ « estonta afero »». Strange !

Grava alvoko al ĉiuj Esp-istoj

Ni petas la atenton de ĉiuj por grava afero, kiu tuŝas la interesojn de la tutmonda esp-istaro. Je la 27-a de aprilo 1937 okazis en sekcio Beverwijk, Nederlando, propaganda kunveno en kiu *la vizitintoj* kantis i.a. « La Espero », muziko de F. de Ménil. Post kelkaj tagoj la sekcio ricevis leteron de la « Nederlanda Oficejo por protektado de Muzik- k Aŭtorrajtoj » (B. U. M. A.) per kiu ĝi postulis la sumon de 3 guldenoj kiel pagon por aŭtoraj rajtoj. Ĉar ni nenion sciis pri la ekzisto de tiuj rajtoj por la kanto « La Espero », same ne B.E.A. (Brita Esp. Asocio) kiu eldonas la kanton, ni turnis nin al la oficejo por pluaj informoj. Al tio la oficejo respondis, ke F. de Ménil estis membro de S.A.C.E.M. (franca organizo por protektado de aŭtor-rajtoj) k sekve de tio « La Espero » estas t.n. protektata kanto *en ĉiuj landoj*, laŭ la konvencio de Berno. Se por « La Espero » oni rajtas postuli pagon por muzika aŭ kanta prezento, tiukaze simpla kantado en eĉ la plej simpla kunveno estas malpermesata sen pago de aŭtor-rajtoj.

Ni nun publike, per la gazetaro petas informojn : 1. ĉu efektive ekzistas kontrakto kun S.A. C.E.M. per kiu ĝi rajtas postuli la pagon de aŭtor-rajtoj por « La Espero »; 2. ĉu en aliaj landoj oni jam spertis malfacilaĵojn pro tio ; 3. ĉu eventuale la heredintoj de F. de Ménil povos nuligi tian kontrakton ; 4. ĉu estas alia rimedo liberigi nin de kontrakto, kiu malfaciligas la propagandon por nia lingvo k sendube ne estas konforma al la ideo Zamenhofa.

Volonte ni ricevos informojn de ĉiu, kiu povas doni klarigon k kontribui al kontentiga solvo.

Estraro de Federacio de Lab. Esp-istoj, Postbus W. 6, *Amsterdam, W.*

ROTERDAMA KONGRESPROTOKOLO

Korektota s. pĝ. 74, kol. 3-a : K-dino *Moore* menciis ja la bezonon de Hispanio pri armiloj, tamen ne proponis, ke oni decidu pri la uzo de la kolektita, mono, sed lasu ĝin dispone al la hisp. registaro, kiu uzu ĝin laŭ maniero, kiun ĝi trovas plej taŭga. — La proverbo de Zamenhof, citita sampaĝe (1-a kol.) tekstas ekzakte jene : « Se ne estus *se* k *tamen*, mi al ĉio dirus *amen.* »

LINGVA KOMITATO. AKADEMIO

S-ro *Isbrucker* estas elektita Prezidanto de la L.K. k Akademio je la loko de s-ro Rollet de l'Isle, kiu rezignis re-elekton. Vicprezidantoj estas s-roj *Baghy* k *Grau Casas*. S-ro *Bailey* okupas nun la postenon de Direktoro de la Sekcio « Komuna Vortaro », s-ro *Cseh* tiun de la Sekcio « Gramatiko » (provizore, ĝis s-ro Lippmann povos repreni sian lokon). Direktoro de Sekcio « Teknikaj Vortaroj » estas s-ro *Helleboid*, de la Sekcio « Kontrolo » s-ro *Rollet de l'Isle*. Neniu nova kandidato por la L. K. estas prezentita, pro decido de la L. K., ke ĝia nombro ne superu 100 (nun estas 107).

FARIĜU STENOGRAFO!

Ekzistas nur tre malmultaj esp-istaj stenografoj. Tamen la ĉefaj stenografaj sistemoj estas alfaritaj al nia lingvo, k multaj studis ilin, sed poste mankis praktika ekzercado. Nur dank'al Stenogr. Instituto Tutmonda (SIT), kiu propagandas la sistemon Duployé-Flageul, la stato pliboniĝis. Ĝi eldonis 72-paĝan ekzercaron, per kiu ĉiu esp-isto serioze laboranta povos atingi ŝatindan rezulton. SIT organizas ankaŭ perleteran kurson. Por havi la necesajn lernilojn por tiu kurso, sendu 10 fr. fr. al *A. G. Provost*, 27, rueChanzy, *Paris (11)*.

POR LA HISPANAJ K-doj

FET aranĝis laŭ instigo de sia Komitato monkolekton, kies rezulto estos sendata al la sindikata helpkomitato por Hispanio. La Bruselaj FET-anoj jam kolektis sumon de 1275 fr. por pago de lito en hospitalo de Ontoniente.

Letero al Han Riner

El Jamaŝiro-maĉi, 25.V.37.

(Fino. Vd. n-ojn 456, 458.)

En Japanio ekzistas tamen io tute speciala : la dieca karaktero de l'Mikado. Kiam oni preterpasas la ĉefan enirejon de la ĉirkaŭremparo, kie loĝas tiu surtera dio, tiam ne malofte oni povas vidi piulojn kun kunigitaj manoj, kun kliniĝinta kapo, kiuj preĝas dum kelkaj minutoj fronte al la sankta loko. Kaj neniu preterpasas tiun lokon, ne demetinte la kapveston k farante pli malpli grandan riverencon. Estas ankaŭ tre notinda apartaĵo, ke jam de 2597 jaroj (laŭ tradicio pri kies kredindo eble necesas fari rezervojn) seninterrompe la sama familio el mikadoj prezidis super la destinoj de la lando. Sendube, por iu ajn, kiu kutimas kredi aŭ aŭdi, ke reĝoj k imperiestroj ricevas sian regrajton de iu unika Dio, kiu loĝas en la ĉielo, por tiu la pretendo de mortonto esti dio sur la tero k ŝuldi al neniu krom al si mem sian aŭtoritaton, povas ŝajni sentoofenda. Sed kiam oni sincere penas por kompreni la fakton, aŭ ĝian signifon rilate al la medio k cirkonstancoj, tiam la unua mirsento baldaŭ malaperas. Notinte la fakton, ke la japana popolo estas politeisto, la ideo pri dio, kiu enkorpiĝas en la sama familio por gvidi nacion ne ŝajnas aparte absurda ; male, ĝi estas logika konsekvenco de premiso pridubinda.

Kiam homoj kiel generalo Nogi k admiralo Togo estas post sia morto la objekto de dia kulto, tio ankaŭ estas logika konsekvenco de la politeismo. Estas pli facile al la simpla popolo akcepti la ideon pri iu dio, kiu enkorpiĝis en ĉiu el tiuj viroj k dotis ilin per eksterordinaraj kapabloj, ol serĉi klarigojn pri iliaj venkoj en strategiaj konsideroj.

Kion ajn oni opiniu pri ĉio tio, estas alia fakto inda je mencio k prikonsidero. La kulto per kiu la japana popolo honoras la Mikadon estas deca, diskreta, delikata ; ĝi ŝajnas al mi malpli groteska ol la bruaj k spektaklecaj manifestacioj, kiujn oni povas vidi en Moskvo, en Romo, en Berlino honore al la respektivaj diktatoroj. Ilia portreto troviĝas ĉie, en ĉiuj formatoj, laŭ ĉiuj pozoj. Precipe en Moskvo la bildo de Stalin estas vera trudobjekto por la okuloj. Tial mi preskaŭ eksentas simpation por la « dio », kiu diskrete tenas sin apartigata en sia modesta palaco. Nenie en Tokio aŭ alie la vido estas logata per bildo de la Mikado ; malofte lia portreto aperas en ĵurnaloj...

Mi pensas, ke estus erara la supozo, ke ĉiuj japanoj kredas je la dieco de l Mikado. Sed se iu maltimemulo permesas al si eldiri publike sian dubon pri tio, ĉiam troviĝas iu fanatikulo por severe puni tian pekulon. Lastan jaron d-ro Tatsukiĉi Minobe, senatano, spertis mem pri tio. Elmetinte tezon, konsideratan hereza, pri la situacio de l'Mikado rilate al la Konstitucio, li ne nur devis eksiĝi el la Senato, sed plie estis viktimo de atenco. Iu ano de reakcia organizo, Ĵusso Ota, 32-jara, pafis al d-ro Minobe per revolvero, sed atingis nur, ke la vundito devis resti en hospitalo dum unu monato.

Tia fanatikismo ne estas io aparta al Japanio. Sufiĉas memori pri antaŭnelongaj okazintaĵoj en landoj, kie diktatoro regas absolutisme, por kompreni, ke la krimo pro estreco-ofendo ne estas malpli severe punata ol tiu pro diecofendo en la « Lando de l'Leviĝanta Suno ».

Jen mi ekrimarkas, ke ĉi tiu letero fariĝas vere tro longa k tamen mi ankoraŭ ne diris kion mi eksciis pri la budaista sekto *Zen*. En Japanio ĝi havas tri grandajn templojn, de kiuj dependas 14.000 aliaj pli malpli gravaj k disaj tra la lando. La zenanoj pretendas esti la plej fidelaj klarigantoj pri la pura doktrino de Gotama Ŝakamuni. Ili asertas, ke la Saĝulo ne ĉiam eldiris sian veran penson, tial ke li kutimis stari ĉe la sama nivelo de komprenkapablo kiel liaj aŭskultantoj. Sed unu el liaj disĉiploj, inter la plej intimaj, Mahakasjapo, komprenis k konservis la « verajn interparolojn de Gotama ». Pli poste, Bodhidharma diskonigis la « puran doktrinon » en Ĉinio. En la 7-a jarcento ĝi estis konata en Japanio, sed ne sukcesis enplantiĝi. Nur en 1228 Dogen, post sia reveno el Ĉinio, sukcesis fondi templon en Uĵi, apud Kioto. Dum la tuta feŭda epoko la sekto Zen havis grandan nombron da adeptoj inter la samurai-oj (nobeloj-militistoj)...

Mi dubas, ĉu via filozofio estas kapabla naski ĉe iu la deziron konstrui templon k, plie, esti ŝatata de militistoj. La aserto de via amiko japana estas klarigebla nur pro lia nescio pri la temo : aŭ li ne konas bone la historion pri la sekto Zen, aŭ li ne ĝuste komprenis vian penson.

Tamen, povas esti trovebla ia parenceco inter la aŭtoro de la « Veraj Interparoloj de Sokrato » k la instruoj de la bonzo Dogen, en tiu senco, ke ĉiu homo devas trovi en si mem la veron. Per meditado la zenanoj serĉas ĝin k pretendas trovi en ia intuicia ekkompreno. Tamen ili legas la *Skribaĵojn* k enkalkulas 28 saĝulojn depost la fondiĝo de la sekto. La fakto, ke ili atribuas nur al kelkaj homoj la kapablon fariĝi saĝulo, kontraŭdiras, ŝajnas al mi, la aserton, ke ĉiu homo povas k devas trovi en si mem la veron t. e. la saĝon ; aŭ oni povas akiri la veron per meditado k tiaokaze ĉiuj zenanoj devus esti saĝuloj ; aŭ nur kelkaj homoj posedas tiun kapablon k sekve la unua aserto estas senvalora.

Sed, se estas vere, kiel asertas hinda aŭtoro, P. L. Narasu, ke ĉio, kio ne estas racia, ne povas esti atribuata al Ŝakamuni, tiaokaze mi facile konsentos, ke via penso

S.A.T. koopera fako

Sekretario : *E. Ŝugar,* 16, Lily Street, *Manchester 8,* Anglio.

De post la sept. komuniko, K-doj aliĝis al la Fako per sufiĉe kontentiga nombro. Ni denove vokas ĉiujn Kooperanojn Esp-istajn kuniĝi en nia Sekcio. La jara kotizo estas tre malalta — 6 1/2 pencoj anglaj, 25 nederl. cendoj, 4 francaj f., aŭ samvaloro en aliaj monoj. Oni sendu la kotizon al la Peranto en la propra lando per poŝtmarkoj aŭ alimaniere, aŭ rekte al la sekretario per 2 resp.-kuponoj. La Perantoj estas : *Anglio :* K-dino A. Moore, 12, Napier House, 51, Ridinghouse Street, *London W. 1. Belgio :* K-do Y. Derieuw, 88, Ballaerstr., *Antverpeno. Francio :* K-do J. Piron, 13, Quai d'Anjou, *Paris 4. Nederlando :* K-do A. J. Gerards, v Lochemstr. 22, *Deventer.*

El Helsinki, Finlando, venas la raporto ke la virinaj membroj de Turkua Laborista Kooperativo ekinteresiĝas pri esp-o. Ili komencas kolektivan korespondon kun la anoj de la Esp. Kurso de la Manĉestra k Salforda Koopera Societo. Eccles Koopera Societo, Lankŝiro, Anglio, starigis esp. kurson kun 17 lernantoj ; la instruanto estas ano de la Fako.

Frakcia Vivo

Ni rememorigas, ke la rajtoj k taskoj de la Frakcioj estas difinitaj en la Regularo pri funkciado de la SAT-Frakcioj (Jarlibro, p. 4). « La Frakcioj ne havas la rajton interveni kiel tiaj en la funkciadon de SAT ». — P. K.

Al la esperantistaj senŝtatanoj

La hisp. proletaro prenis sur sin la gigantan taskon haltigi la reakciularon, sed bedaŭrinde ĝi ne estas helpita de l'internacia proletaro, ĉar parto da ĝi ĝemas sub jugo de l'faŝismo, alia metas la bonon de l'propra lando je la loko de solidar-agado. La forgesita Hispanio per sia lasta spiro batalas. Sed ne sufiĉas la heroaj bataloj de kelkaj milionoj da nesufiĉe armitaj homoj por venki super la faŝismo. Sed ni zorgu ke ĉi tiu malvenko estu por ni la lasta ! Ni lernu el la hisp. sperto. Unu el la kialoj de l'malvenko estas, ke la proletoj en ĉiu lando estas lasitaj al siaj propraj fortoj. Kiel esp. senŝtatanoj ni grupiĝu frakcie ĉirkaŭ SAT k laboru por la Socia Revolucio. Ni uzu SAT kiel peresp-an organizon. Al la subskribintoj esp-o jam multe helpis en la kontraŭfaŝista batalo. Sed por plene eluzi la ilon, ni ĉiuj devas grupiĝi k eldoni literaturon. Sen tio estas malfacile labori por nia ideo. Ni fondu do preskapitalon k provu estonte aperigi almenaŭ broŝurojn, ekz. pri Hispanio. Jam ni, terorlandanoj, tiucele pretas disponi ioman sumon. Ni montru, ke per SAT eblas fari taŭgan peresp. laboron. Agu tuj !

SAT-anoj senŝtatanaj ...62 k ...3.

Ekster nia movado

La Brazila registaro eldonis jubileo-poŝtmarkon, kiu prezentas la terglobon kun rubando portanta la enskribon « Ora Jubileo de Esperanto » k supre la daton : 1887/1937. Valoro : 300 rejsoj. Jen valora propagandilo en niaj manoj. Duon-faŝista registaro subtenas k akcelas la esp. movadon. Kaj la t.n. maldekstremaj registaroj, kion ili faras tiurilate?

La 30-a Universala Esp. Kongreso okazos de 20. julio ĝis 6. aŭgusto 1938 en Londono. Sekretaria adreso : 30-a Univ. Kongreso de Esp-o, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglio. Kongresejo : University College, Universitato de Londono. Kotizoj : ĝis jarfino : £ 1 ; poste £ 1-5 k L. 1-10. Oficiala organo (senpaga por aliĝintoj): *The British Esperantist.*

Nia poŝto

K-do Abio. — Vi estas petata de la FLE-sekcio en Alkmaar, pravigi viajn dirojn faritajn en publika kunveno rilate drinkemon de la la-

---

estas budaeca. La libro, en kiu la aŭtoro klarigas tiun tezon, havas kiel titolon : « The Essence of Buddhism » (La Esenco de l'Budaismo). Mi komencis la legadon de tiu verko pro du motivoj : unue, la temo interesas min ; due, mi estas gasto ĉe liberpensa budaisto kiu komencis ĝin traduki esperanten. Sed, ĉar li ne konas la anglan lingvon, li tradukas el japana traduko, kio estas bedaŭrinda. Kvankam mia scio de la angla lingvo estas ne profunda tamen mi kredas povi iom helpi en tiu traduka laboro, komparante la tradukitan tekston kun la originalo. Tial ke mia budaista amiko jam publikigis antaŭ kelkaj jaroj la unuan ĉapitron de tiu verko, mi sendas al vi unu ekzempleron, kiun li donacas al vi. Mi klarigis al li pri via filozofio k verkaro k vi jam akiris novan simpatianton. Malgraŭ tio, ke la cirkonstancoj nun ne estas favoraj por la elmontro de liberpensemo, tamen, s-o Takeuĉi (tiel nomiĝas mia gastiganto) intencas publikigi biografian studeton pri via verkaro. Ĉar vi estas senkonscie budaista, estas tute nature, ke konscia — sed ne organizita (1) — budaisto ne ignoru vin...

La budaistaj sektoj estas multnombraj. Ĉiu pretendas instrui pli bone ol la aliaj la « veran » penson de l'Majstro. Tiurilate la historio pri budaismo tre similas al tiu pri la kristanismo. Ekzistas tamen notinda diferenco inter ambaŭ movadoj religiaj : la fanatismo de la admirantoj de Budao neniam atingis la gradon de furiozo, kiun havis mezepoke la adorantoj de Kristo. Nenio estas trovebla en la historio pri la religiaj sektoj el Oriento, kio estas komparebla al la Inkvizicio, al la « Dragonnades » (2), al la proreligiaj militoj, kiuj sange makuladis la duan duonon de la deksesa jarcento en Francio k alie.

Tia fakto ŝajnas al mi tre grava. Se la orientanoj estus pli bone informitaj pri la kristanismaj aferoj, neniam kruco superstarus la plej malgrandan templon en Ĉinio k Japanio. Verdire, ŝajnas, ke en ĉi tiu lasta lando la kristanismo jam atingis sian apogeon. Mi ne diros, ke ĝi jam nun malleviĝas ; tamen estas certe, ke ĝia influo estas sensignifa k tre ofte rezultas de konsideroj, kiuj havas nenion komunan kun la deziro aliĝi al la « vera religio ».

Tiu ĉi letero estas jam tro longa k pro tio mi petas vian indulgon, tamen, por respondi al la demando, kiun vi starigis pri via *Ahasveruso* (1), necesus verki tutan volumon. Cetere, mi ne havas la necesan kompetenton por ektrakti tian temon. Tial mi nur tradukos por vi kelkajn alineojn el antaŭparolo anglalingva de japana libro, aperinta en 1911. Ĝi havas jenan titolon : *Historio pri la Antikva Japanio,* k la nomo de la aŭtoro estas *T. Kimura.*

« La celo de ĉi tiu verko estas montri, ke nia praularo havis greko-latinan originon ; ĝi disvastiĝis kiel konsekvenco de la *Amfikcionioj* (Kunvenintaroj de delegitoj senditaj de la federaciitaj popoloj el la antikva Grekio) okazintaj en la lando Na'iri (Malgrandazio) t. e. la lando de la lago Van. Mia esplorado celas pruvi, ke niaj praul0j unue loĝis en Grekio, ke ili migris en Egiption k Abesinion k, post kiam ili subigis Persion, Hindion k Siamon, ili fine venis en niajn insulojn... »

« ... La rezulto de mia kompara studo super mitoj k lingvoj naskis en mi la konvinkon, ke la japana popolo apartenas al la greko-latina raso... »

« ... La japana lingvo estas unu el la plej antikvaj. Pluraj vortoj el mortaj lingvoj k aliaj kiuj ekskutimiĝis estas ankoraŭ uzataj ĉi tie. Multaj nomoj de lokoj en Okcidento, kies deveno aŭ signifo estas nekonata, ricevas klarigon en la lumo de nia lingvo. Multaj kutimoj k moroj el Okcidento, kies origino estas konsiderata kiel netrovebla, estas bone klarigataj per komparo kun tiuj el Japanio... »

Se la tezo de tiu aŭtoro estas iom kredinda, estas evidente, ke la demando ĉu via « Ahasveruso » estas pli japaneca ol judeca ne plu havas la saman intereson. La « subteraj fratecoj » pri kiuj vi aludas, facile klariĝas.

Mi ne kuraĝas eldiri opinion pri la ideoj de s-ro Kimura. Tamen, oni eble povus apogi ilin per aliaj konsideroj ol tiuj de kompara studo super moroj k lingvoj. La japana popolo konsistas el tre diversaj tipoj, escepte blondharulojn. Mi havis okazojn vidi virinojn, kies haŭtkoloro estas pli blanka ol tiu de hispaninoj aŭ de francinoj el la suda regiono. En la malgranda urbo, kie mi nun estas, kelkfoje mi renkontis junulon, kies fizionomio pensigis min pri alĝerianoj pro similo en la trajtoj. Estas eraro kredi, ke ĉiuj japanoj estas malaltkreskaj : unu el la policistoj, kiuj demandadis min en Tokio, havas almenaŭ 180 cm. da alto k la luktistoj, kies portreton publikigas preskaŭ ĉiutage ĵurnaloj, estas kolosoj, kiuj pezas pli ol 100 kg. Se la plimulto de la nazoj estas platkurbaj, aliaj estas rektaj, k mi eĉ vidis kelkajn, kiuj estas aglaj. Nur la formo de la okuloj estas vere karakteriza k mi ne vidis homojn kun « fiŝaj okuloj ». Japanoj ja uzas iafoje tiun bildon moke, parolante pri okcidentuloj...

Konvenas, ke mi bremse haltigu mian skribemon. Eble vi ne kuraĝos legi ĝis ĉi tie. Mia senkulpiĝo estus, ke vi starigis demandojn, kiuj instigis mian babilemon, sendube bagatela. Atentu nur mian bonan intencon k indulgu vian malbonan disĉiplon, kiu ne havas alian meriton pri via atento ol sia sincera k admira amikeco al vi.

E. LANTI.

---

(1) Ŝerca aludo al la ŝablona frazo : *klaskonsciaj k organizitaj laboristoj.*

(2) Persekutoj kontraŭ la protestantoj en suda Francio post nuligo de l'Nanta edikto. (Dragonoj estis la ĉefaj ekzekutantoj.)

(1) « Ahasvérus », titolo de unu el verkoj de H. Riner.

boristoj en Svedio k Norvegio. Laŭ informoj, kiujn havigis al si kelkaj ĉeestintoj, via aserto estas tute senbaza.

Františ́ek Taraba, Rajaĉko. — En sept. 36 ni sendis al vi, laŭ via mendo, 5 insignojn por 12 fr. Ni konfirmis per P. la 30. 7. 1937. Kial vi ne pagas?

19.868. Via artik. aperos venontnumere.

K-do W. Lekovski. — Bonvolu finfine likvidi vian ŝuldon al la Asocio : fr. fr. 439,40 k zlotoj 76,48 ! Ni devis jam sufiĉe longe pacienciĝi.

Memornoto

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS: *Signalen*, Stokh., 7., 14., 21., 28. 10., 4. 11.; *Zarja*, Sofio, 2., 16., 23. 10. (ĉiusemajna esp. rubriko); 4. *Internationale*, Kopenh., okt. (esp. rubriko); *Le Travail*, Verviers, 13. 10., 11. 9.; *Tipogr. Bult.*, Paris, sept./okt.

RECENZEJO

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO, n-oj 4-7. Eldonejo J. Muusses en Purmerend (Nederlando). Prezo ponumera : 0.35 gd. (Abono al dek vol. 2.50 guld.)

4. Jos. R. Scherer : TRA USONO KUN RULIĜANTA HEJMO. 36 paĝoj. La konata propagand-paroladisto uson-svisa, J. R. Ŝerer, profesia mondvojaĝisto, en tiu ĉi libreto skizas sian vojaĝon tra la diversaj ŝtatoj de Usono, per simplaj frazoj k en flua stilo. Li prave substrekas la avantaĝon, kiun havas Usono, kompare kun la eŭropaj ŝtatoj, ĉar estas for la doganbaroj k pasportaj malfacilaĵoj sur tiu vasta k multŝtata teritorio. Neniam oni devas ĉe la polico anonci sian restadon en iu urbo. La ombrajn flankojn de la bildo li ne pritraktas en sia priskribo.

5. J. Glück : EL LA KLASIKA PERIODO DE ESPERANTO. 26 paĝoj. — En tiu ĉi broŝuro la aŭtoro dankinde prezentis al ni resume la grandegan verkaron de Grabowski k Kabe (K. Bein), pioniroj el la unua periodo de esperanto, al kiuj la esp-istaro ŝuldas ĉiaman dankan memoron pro tio, kion ili donis al la movado. La elekto de l'literaturaj tekstoj estas trafa k bonvena.

6. k 7. enhavas sur 22 k 24 paĝoj la konatajn KONGRESPAROLADOJN de D-ro ZAMENHOF (kun escepto de la 8-a, ĉe la Krakova kongreso). Krome ni trovas reprodukton de la konata letero de Zamenhof al N. Borovko, en kiu li klarigas la subjektivajn kaŭzojn, kiuj instigis lin al la kreo de esperanto. — Do plej klasika literaturo, kiun ĉiu esp-isto devus koni, tiel laŭ la lingva, kiel laŭ la enhava vidpunkto.

ARGENTA DUOPO. Jubilea libro pri BAGHY k KALOCSAY. Dukolore presita. Form. 15 × 23,5 cm. Unua volumo : 208 pĝ. Prezo : 0.90 dolaro plus 10 %, por sendkostoj. Kun diversaj bildotabuloj reprezentantaj la du verkistojn en diversaj fazoj de ilia vivo (ekz. kiel suĉinfanoj).

CICIO MAR : FORGESITAJ HOMOJ. Originale verkitaj noveloj de juna ĉina verkisto. 240 pĝ. Form. 13 × 18.5. Prezo : 5 resp. kup. aŭ egalvalora mono. Eld. La Verdfolia Librejo, P. O. Box 721. *Shanghai.* Melankoliaj, proletecaj rakontoj, kiujn oni legas ĝue malgraŭ ne tre korekta lingv-uzado de l'aŭtoro.

P. DANOV : EN LA REGNO DE LA VIVA NATURO. Eld. Biblioteko « Nova Kulturo », *Sevlievo* (Bulg.), 1937. 92 paĝoj. Form. 12,5 × 17,5 cm. Prezo : 0.80 sv. fr. Dua eldono.

LA VOJO (Himno Esperantista). Poemo de D-ro ZAMENHOF. Muziko de RENE DESHAYS. Tria eldono. Reeldonis Esp-ista Centra Librejo, 11, rue de Sèvres, PARIS. Kanto k fortepiana akompano. Prezo : 2 fr. fr.

Al bela poemo de Zamenhof R. Deshays kreis indan muzikon laŭ ŝumana inspiro, kiun la SAT-kongresanoj en Roterdamo povis ĝui pere de la bela voĉo de K-do Blok.

VIIPURI, Finlando. Bela, multkolora, arta prospekto, havebla ĉe Hannes Koivu Pellervonkatu 10. B. 12, VIIPURI (Finlando).

PROSPEKTOJ K AFIŜOJ DE FOIROJ (ne ankoraŭ menciitaj): LYON'O (Francio) eldonis kvinkoloran afiŝon k sorbpaperon kun propaganda teksto esp-lingva por sia ĉimarta foiro. PARIZO (foiro en majo) eldonis ilustritan prospekton en esp-o. La VIENA FOIRO (5./12. septembro) eldonis dukoloran prospekton.

GRANDA AFIŜO PLURKOLORA eldonita de la Propaganda Komisiono de la Ĝeneralitato de Katalunio kun teksto en esp-o adresita al la esperantistoj.

AUSTRIA ESP. FEDERACIO (Holochergasse 55, Vieno, XV) eldonis okaze de la Esperanto-Jubileo artajn poŝtkartojn kun portreto de Zamenhof, leterpaperon k kovertojn (prezo nemontrita).

RAPORTOJ K KONKLUDOJ DE LA INTERNACIA KONFERENCO DE PARIZO (14./17. majo 1937) : Esperanto en la moderna vivo. (Esperanto en Lernejoj. Sciencoj k Teknikoj. Internacia Trafiko. Intelektaj Interŝanĝoj). 142 pĝ. Form. 13,5 × 20,5 cm. Prezo (afrank.) 12 fr. fr. Eld. *S. F. P. E.*, 34, rue de Chabrol, *Paris (10).*

Ĉi tiu broŝuro donas klaran bildon pri la klopodoj de la Internacia Konferenco, por enkonduki esp-on en la diversaj medioj de la homa aktiveco.

ORA LIBRO DE LA ESP.-MOVADO (1887-1937). Redaktis : *V. Bleier* k *E. Cense*. Eld. Loka Kongresa Komitato de la XXIX-a Univ. Esp. Kongreso en Varsovio. Form. 23 × 15 cm. 224 pĝ. kun ilustraĵoj. Prezo : —.72 us. dol. plus 10 % por sendkosto. Ĉefkomisio ĉe Lit. Mondo, Budapest IX.

Oni trovas en tiu ĉi bele prezentita volumo ĝeneralan trarigardon super la historio de nia lingvo, ankaŭ super la literatura historio, biografieton pri la « veteranoj » (esperantistoj de antaŭ la jaro 1905), krome profetaĵojn pri la estonto de esperanto, de konataj nuntempaj esp-istoj.

ISMAEL, GOMES BRAGA : VETERANO ? Respondoj al la demandoj por la « Festo de la Veteranoj », aranĝita de la Jubilea Kongreso de Esp-o. Eldono de « Gazeto de Ameriko, *Rio de Janeiro* (mendoj al Livraria Editora de F. E. Brazileira, Av. Passos, 30, Rio de J.). 126 pĝ. Form. 12,5 × 18,5. Prezo : (afr.) 1,50 sv. fr. aŭ 0.40 us. dol.; tolbind. 2,50 (aŭ 0,60).

Ĉi tiu estas la unua libro originale verkita k presita en Brazilio. La braz. esp-istoj esperas, ke ĝi bone vendiĝos, por tiel apogi k kuraĝigi la eldonadon de pliaj esp. libroj en Brazilio je risko de la neesp-ista eldonisto. Braga en sia libro traktas pri esperantismaj problemoj k oni trovas kelkloke ankaŭ favorajn k atentigajn notojn pri la agado de SAT.

L. L. ZAMENHOF : LA ESSENCIA E FUTURO DE IDEIA DE LINGUA INTERNACIONAL. Trad. k komentis *J. Gomes Braga*. 86 plus XXX paĝoj. Form. 12,5 × 18.5. Prezo nemontrita. Portugallingva propagandilo, eldonita en Brazilio (sama eldonejo kiel supre).

LA MEDICINA CATALANA (Kataluna Medicino). La n-o 37/38 de tiu Revuo bele prezentita entenas resumaron de la artikoloj en esp-o.

KOPENHAGA PLANTPATOLOGIA INSTITUTO. La Jarraportoj de 1935/36 k 1936/37, verkitaj de K-do *Neergaard*, entenas esp-lingvan resumon.

WAT WIJ DOEN ! (Kion ni faras). Propaganda broŝuro holandlingva, verkita de K-do *A. Veen*, sekret. de F.L.E. k eldonita de F.L.E. (adreso : Postbus 0,50, Amsterdam). Prezo : 0,05 fl., 20 paĝoj. Form. 13,5 × 21 cm. La broŝuro priskribas la laboron plenumatan de la Federacio.

Korespondado

Antifaŝistoj atentu ! La Esp. Klubo, la Hispana Helpkomitato k la faksindikata ĉeforganizo de Södertälje kune aranĝos ekspozicion antifaŝistan meze de januaro. Ni insiste petas materialon esperante k alilingve. Ekz. libroj, broŝuroj, gazetoj, afiŝoj, flugfolioj, i.a. insignoj, statistikoj, ktp. Ni resendos, se estas dezirate. La ekspozicio post la loka prezentado migros tra Svedio. Adreso : *Karl Axelsson*, Dalgatan 7 B n.b. *Södertälje* (Svedio).

LETERVESPERO. La infangrupo « La Verdaj Pigoj » (Gouda) aranĝos letervesperon je la 9-a de decembro. Skribu ĉiuj. Ni certe respondos. Adresu al : *P. Becker*, Winterdijk 15 a, *GOUDA* (Nederlando).

EKSPOZICIAN MATERIALON, a) diverslandajn esp. lernolibrojn (kontraŭ pago de sendkostoj), b) deĵortabelojn, vojaĝkartarojn, laborkondiĉojn, urbajn tramplanojn ktp, helpe de diverslandaj tramistoj *(interŝanĝe)*, c) prospektojn, informojn pri laborkondiĉoj ktp pri *fervojistoj*, ĉ) daŭran kontaktiĝon de speciala transport- k trafiklab. esp. grupo (mallongigo : U.R. T.T.E.G.), adresojn de similaj grupoj, deziras la prizorganto de l'distrikta ekspozicia fako k sekretario de URTTEG, K-do *W. M. Kruyt*, N. Beetsstr. 26 b, ROTTERDAM (W), Nederlando.

FRANCIO

Grupo de komencantoj dez. koresp. per PI kun gelernantoj el ĉ.l. pri vivkondiĉoj. Resp. garant. Adr. : *Constans*, 7, Bould. Gambetta, *Narbonne*, Aude.

Kiu serĉas PM de ĉiuj landoj, povas ricevi tiajn, skribante al K-do *H. Harazin*, 21, rue Vicq d'Azir, *Paris 10*. Petu oferton !

Lernantoj de Pariza kurso dez. koresp. kolektive kun alilandaj gekursanoj. Adresu al : K-do *J. Chiland*, 8, rue de Prague, *Paris 12.*

NEDERLANDO

Kelkaj K-doj dez. kor. kun Gek-doj el ĉiuj landoj pĉt. Resp. garantiata. Sendu leterojn grandnombre al K-do *J. Tjepkema*, 2-de Torendw. str. 15, *Huizum* (Leeuwarden).

La pedagogia oficejo vegetara « Wernik », Huize Physica 2, de Barendseweg B. 358, *Barendreckt* (Z.H.), Nederlando, deziras esplori la valoron praktikan de esp-o por sia Instituto. Tial ĝi faras jenan peton : Interesatoj pri vegetarismo k laŭnatura kuracado bonvolu sendi al ĝi gazetojn k presaĵojn informantajn pri la vegetara k naturista movado en la tuta mondo.

K-doj ! Nuntempe la mondo estas malgranda; faŝismo k naciismo superombras ĝin, bremsadas esp-on ĉe ĝia venkiro. Tial mi esperas, ke K-doj kiuj povas plenumi supran peton, faru tion. Ĝi malfermas novajn eblojn al esp-o sur tereno, kies grundo ja estas matura por rikolto, sed la rikoltantoj ankoraŭ mankas. Per komunaj fortoj k aktiveco ni povas ripari tion ; do ekagu k sendu viajn korespondaĵon kc. al supra adreso. Respondo garantiata.

DEVO PRO DANKEMO

La vidvino de la konata pioniro de la esp.-movado *Wiebe Nutters* (mortinta 1926 en Amsterdamo), kvankam ne vivante en vera mizero, tamen troviĝas en tre malbonaj cirkonstancoj. Personoj, kiuj memorante tiun senlacan laborinton por la esp. afero, deziras kontribui iom por faciligi la vivon al lia vidvino, bonvolu sendi eĉ malgrandan monsumon (poŝtĉekkonte aŭ per respondkuponoj) al la subskribinto. La mono estos kvitancata en « S-ulo ». Prof. *G. Mannoury*, Corn. Krusemanstraat 29-II, Amsterdam (Z). Poŝtkonto 81324 Amsterdam.